3me Année, No 27. Novembre 1904. — 3a Jaro, 27a Numero. Novembro 1904. — 3e Jaar, Nr 27. November 1904.



Aliĝinta al la Unuigo de la Perioda Belga Gazetaro

Affilié à l'Union de la Presse Périodique Belge.

Aangesloten bij het Verbond der Periodieke Belgische Drukpers.

PRIX DE L'ABONNEMENT ANNUEL:	KOSTO DE LA JARA ABONO:	JAARLIJKSCHE INSCHRIJVINGSPRIJS:
2.50 fr. pour la Belgique; 3.00 fr. pour l'étranger. 5.00 fr. (minimum): abonnement de protecteur.	2.50 fr. en Belgujo; 3.00 fr. en eksterbelgaj landoj. 5.00 fr. (almenaŭ): protektanta abonanto.	2.50 fr. voor België; 3.00 fr. voor den vreemde. 5.00 fr. (ten minste): inschrijving als beschermer.
Un numéro: 0,25 fr.	**Unu numero: 0,25 fr.**	**Het nummer: 0,25 fr.**

La personoj, kiuj sendos al ni almenaŭ sumon da kvin frankoj, estos enskribitaj kiel protektantaj abonantoj kaj ilia nomo estos presita en ia proksima numero.

Nia ĵurnala jaro komenciĝas la 15an de Septembro. Se oni abonas post tiu-ĉi dato, oni ricevas la jam elirintajn numerojn.

Les personnes qui nous enverront au moins la somme de cinq francs seront inscrites comme abonnés protecteurs et leur nom paraîtra dans un prochain numéro.

L'année de notre Journal commence le 15 Septembre. Si l'on s'abonne après cette date, on reçoit les numéros déjà parus.

De personen die ons ten minste de som van vijf franken toezenden zullen opgeteekend worden als inschrijvers-beschermers en hun naam zal in een aanstaande nummer gedrukt worden.

De jaargang van ons Blad begint met 15n September. Indien men zich na dien datum laat inschrijven, ontvangt men de reeds verschenen nummers.

ENHAVO.

SOMMAIRE.

INHOUD.

A.-J. WITTERYCK-DELPLACE.

IMPRIMEUR-ÉDITEUR
BRUGES, NOUVELLE PROMENADE, 4.

DRUKKER-UITGEVER
BRUGGE, NIEUWE WANDELING, 4.

JOURNAUX ESPÉRANTISTES — ESPERANTISCHE BLADEN.

Lingvo Internacia, fr. 4.00 par an (*4.00 fr. 's jaars*). Mr PAUL DE LENGYEL, 33 rue Lacépède, Paris Ve.

L'Espérantiste, revue officielle de la Société rrançaise pour la propagation de l'Esperanto, 20 pages (format 15 × 20) de texte Esperanto-Français, 8 pages de couverture, correspondance internationale en Esperanto gratuite pour les abonnés. 3.50 fr. par au (*3.50 fr. 's jaars*) 4.00 francs avec inscription à la Société (*4.00 fr. met aanneming in de Maatschappij.*) Administration de l'Espérantiste à Louviers (Eure) France.

Societo por Internaciaj Rilatoj (S. I. R.), fr. 3.00 par an (*3.00 fr. 's jaars*); avec l'organe de la Société (*met het orgaan der Maatschappij*) « **Lingvo Internacia** » fr. 6.00 par an (*6.00 fr. 's jaars*) Mr PAUL FRUICTIER, 27, boulevard Arago, Paris.

Literatura Biblioteko de Lingvo Internacia, fr. 2.50 par an (*2.50 fr. 's jaars*) Mr PAUL DE LENGYEL 33 rue Lacépède, Paris Ve.

Rondiranto, fr. 4.00 par an (*4.00 fr. 's jaars*) Mr G. P. OREŜKOV, Plovdiv, Bulgarie & L. COGEN, 61 rue des Rémouleurs, Gand.

La Holanda Pioniro, fr. 3.00 par an (*3.00 fr. 's jaars*) Mr DREVES UITTERDIJK, Hilversum, Holland.

Ĉesky Esperantista (Bohem. Esp.), fr. 3.50 par an (*3.50 fr. 's jaars*) Mr ĈEJKA, Th. Bystrice-Hostyn, Moravie-Autriche.

L'Esperantista, fr. 4.00 par an (*4.00 fr. 's jaars*) Grafo ALBERT GALLOIS, Riolunato, prov. de Modena, Italie.

La Svisa Espero, fr. 2.50 par an (*2.50 fr. 's jaars*) Mr TH. RENARD, 6, rue du Vieux Collège, Genève, Suisse.

Antaŭen Esperantistoj! 0,150 Livroj = fr. 3,00 par an (*3,00 fr. 's jaars*) Mr ANT. ALVARADO, str. Lartiga no 106a Lima, Pérou.

Ĉilio Esperantista, gratuit au Chili (*kosteloos in Chilië*) Mr LUIS E. SEPULVEDA CUADRA, cas. 1989, Santiago, Chili.

The Esperantist, fr. 4.00 par an (*4.00 fr. 's jaars*), Mr H. BOLINGBROKE MUDIE, 41, Outer Temple, W. C. London, England & M. SEYNAEVE, 3, rue de l'Avenir, Courtrai. Un numero : 40 Cmes.

La Juna Esperantisto, 2.00 fr. par an (*2.00 fr. 's jaars*). Mr H. HODLER, 9 avenue des Vollandes, Genève, Suisse.

Internacia Scienca Revuo, fr. 7.00 par an (*7.00 fr. 's jaars*), HACHETTE & Cie, 79, Bd St Germain, Paris.

Espero Katolika, fr. 2.50 par an (*2.50 fr.'s jaars*), M. BARBOT-BERRUER, 72, rue des Halles, Tours (France) & M. MATTELAER, 3, place de l'Université, Louvain.

Esperantistische Mitteilungen, fr. 2.00 par an (*2.00 fr. 's jaars*). M. BOREL, Prinzenstrasse, 95, Berlin.

Revuo Internacia de Stenografio, fr. 3.00 par an (*3.00 fr. 's jaars*). DREVES UITTERDIJK, Tulpstraat, 74, Hilversum (Holland).

La Meksika Lumturo, fr. 3,00 par an (*3,00 fr. 's jaars*), Dro A. VARGAS, Santa Rosa Necoxtla (Ver.) Mexique.

Esperanta ligilo (por blinduloj), 3.00 fr. pour 1904 (*3.00 fr. voor 1904*), Mr TH. CART, 12, rue Soufflot, Paris.

Esperantistaj grupoj en Belgujo.

Poliglota Klubo en Bruselo, Esperantista Sekcio. Sidejo : Hôtel Ravenstein, rue Ravenstein, 3. Sekretario Sro L. Blanjean.

Antverpena grupo Esperantista. A. G. E. Sidejo : Taverne Royale, Place Verte, 39. Prezidanto : Sro Ray. van Melckebeke; Sekretarioj, L. Jamin kaj F. Dupont.
Kunvenoj ĉiusabate je la 8 1/2 horo.

Esperantista Katolik-Universitata Grupo E. K. G. Sidejo : Loveno. Sekretario : P. Mattelaer, 3, place de l'Université, Louvain.

Esperantista Lovena Grupo. Sidejo : Taverne St Jean. Café Monico, rue de Diest. (Louvain, Leuven). Prezidanto Sro Edm. Vandieren. Sekretario Sro Eŭg. Mathys, filo, Aŭgustanstrato, 5a.
Virina Sekcio : Sekretariino, Frino Cl. Nythals.

Esperantista Studenta Grupo. Sidejo : Hôtel des Notaires, rue des Boutiques, Gento (Gand, Gent). Prezidanto : Dro M. Seynaeve, sekretario : Sro R. de Bie, 128, chaussée de Courtrai, Gand.

Bruĝa Esperantista Grupo. Sidejo : Bruĝo (Bruges, Brugge). Prezidanto : Sro A. J. Witteryck, sekretario : Sro Lekeu, 49 rue Wallonne.

Esperantista Grupo en Lieĝo. Prezidanto : J. de Hemptinne, Sekretario : G. Sloutzky, 93B, rue Jean d'Outremeuse, Liége.

Esperantista Grupo en Meĥleno. Prezidanto Sro L. Van Peteghem ; Sekretario : L. Van Elst, rue Notre Dame, Malines (Mechelen).

Universitatoj Popolaj en Cureghem kaj Molenbeek (Bruselo). Profesoro : Sro Vital Bické, avenue de Scheut, 62, Anderlecht-Bruxelles.

Universitato Popola en St Gilles (Bruselo) Esperantista Sekcio. Sidejo : rue du Fort, 80. St Gilles-Bruxelles.

Supplément au nro de Novembre 1904 du journal « La Belga Sonorilo ».

Nova Libro!



Nova Libro!

ĈE WITTERYCK-DELPLACE, BRUĜO.

PAĜOJ

EL LA

FLANDRA LITERATURO

KOLEKTITAJ KAJ TRADUKITAJ

DE

Dro M. SEYNAEVE

KAJ

Dro R. VAN MELCKEBEKE.

Aro da Esperantaj tradukoj el la plej bonaj verkoj tiel prozaj kiel poeziaj de la plej indaj flandraj verkistoj;

Kun priskriba artikolo pri la deveno de la Nederlanda Literaturo en Flandro kaj pri la interrilatoj de la holanda kaj de la flandra partoj de tiu Literaturo;

Kun mallongaj skizetoj pri la literatura karaktero de l' pritraktitaj verkistoj;

Kun Aldono pri la Reguloj de la Esperanta Versofarado;

Aprobita de Dro Zamenhof.

ĈE WITTERYCK-DELPLACE,
BRUĜO.

Prezo : fr. 1,50 Prezo : fr. 1,50

Paĝoj el la Flandra Literaturo.

Estimata Samideano,

Mi havas la honoron prezenti al la tutmonda Esperantistaro novan verkon, titolitan : « Paĝoj el la Flandra Literaturo » kaj verkitan kunlabore de du el niaj plej bonaj Belgaj Esperantistoj : S^ro^ D^ro^ M. Seynaeve, Redaktoro de la ĵurnalo « La Belga Sonorilo » kaj S^ro^ D^ro^ R. Van Melckebeke, Prezidanto de la Antverpena Grupo Esperantista

La celon de la verkintoj konigas la jenaj vortoj, eltiritaj el la antaŭparolo de la verko : « Prezentante la jenan libron al la Esperantistaro, ni celas konigi al ĝi en maniero iom plena la konindan flandran literaturon. Jam, el diversaj flankoj kaj precipe en la nuna tempo, oni presiĝis tradukaĵojn el apartaj verkistoj sed, neniam ĝis nun, oni publikiĝis aron da fragmentoj el samnaciaj literaturistoj, aron kapablan konigi, kion ne povis fari apartaj tradukaĵoj, la esencon, la emojn, la ecojn de ia nacia literaturo ».

Por atingi tiun celon, la verkintoj, helpitaj de kelkaj aliaj Belgaj Esperantistoj, majstre tradukis proze kaj poezie la plej belajn paĝojn el la verkoj de multaj flandraj literaturistoj. Ni citu inter la tradukitaj verkistoj la nomojn de David, Ledeganck, Conscience, Snieders, Van Rijswijck, Van Beers, Guido Gezelle, Bergmann, R. kaj V. Loveling, Antheunis, Van Oye, De Cort, Hugo Verriest, Rodenbach, Pol de Mont, Hilda Ram, Noterdaeme, Stijn Streuvels, De Clercq, Broeckaert.

La tradukaĵoj, plej akurate faritaj, tre bone remontras la ecojn de la originaloj kaj ree pruvas (precipe la multaj paĝoj el la verkoj, tiel malfacile tradukeblaj, de G. Gezelle, S. Streuvels kaj aliaj) la grandegan superecon de la lingvo internacia, por la literaturaj tradukoj, super la naciaj lingvoj.

Ĉi tiu verko, korektita kaj aprobita de D^ro^ Zamenhof, sin trovos inter la plej bonaj de la Esperanta Literaturo kaj devos ĉeesti en la biblioteko de ĉiuj ĉu belgaj ĉu fremdaj Esperantistoj ; ĝi ankaŭ treege utilos por la propagando de Esperanto en Belgujo.

A.-J. WITTERYCK.

Cher Collaborateur,

J'ai l'honneur de présenter au monde Espérantiste un nouvel ouvrage, intitulé : « *Paĝoj el la Flandra Literaturo* » et dû à la collaboration de deux de nos meilleurs Espérantistes Belges : M. le Dr Seynaeve, rédacteur du journal « *La Belga Sonorilo* » et M. le Dr Van Melckebeke, président du groupe Espérantiste d'Anvers.

Le but qu'ont poursuivi les auteurs se trouve défini dans ces lignes que nous lisons dans la préface de l'ouvrage : « En offrant ce livre aux Espérantistes, nous avons pour but de leur faire connaître d'une façon quelque peu complète une littérature bien digne d'être connue d'eux : la littérature flamande. Déjà, de divers côtés et surtout en ces derniers temps, on a publié des traductions d'auteurs isolés mais, jamais jusqu'à ce jour, on n'a publié un recueil de traductions de représentants d'une même littérature, recueil capable de faire connaître, ce que ne pouvaient des traductions isolées, l'essence, les tendances, les qualités de la littérature d'un peuple quelconque ».

Pour atteindre ce but, les auteurs, avec le secours de quelques Esperantistes Belges, ont traduit magistralement, en prose et en vers, les plus belles pages de nombreux écrivains flamands. Citons parmi les auteurs traduits : David, Ledeganck, Conscience, Snieders, Van Ryswyck, Van Beers, Guido Gezelle, Bergmann, R. et V. Loveling, Antheunis, Van Oye, De Cort, Hugo Verriest, Rodenbach, Pol de Mont, Hilda Ram, Noterdaeme, Stijn Streuvels, De Clercq, Broeckaert.

Les traductions, faites avec le plus grand soin, rendent très fidèlement les qualités de l'original et attestent une fois de plus (notamment les longues pages consacrées aux œuvres, si difficiles à traduire, de Guido Gezelle, Stijn Streuvels et autres) l'immense supériorité de la langue internationale, sous le rapport des traductions littéraires, sur toutes les langues vivantes.

Cet ouvrage, corrigé et approuvé par le Dr Zamenhof, comptera parmi les meilleurs de la Littérature Espérantiste et a sa place tout indiquée dans la bibliothèque de tous les Espérantistes tant belges qu'étrangers ; il est appelé aussi à rendre de précieux services dans la propagande de l'Esperanto en Belgique.

A.-J.-WITTERYCK.

Geachte Medewerker,

Ik heb de eer aan de Esperantische Wereld een nieuw werk aan te bieden, getiteld : « Paĝoj el la Flandra Literaturo » *en verschuldigd aan de samenwerking van twee onzer uitmuntendste Belgische Esperantisten : Heer Dr Seynaeve, Opsteller van het blad* « La Belga Sonorilo » *en Heer Dr Van Melckebeke, Voorzitter der Esperantische Groep van Antwerpen.*

Het doel dat de schrijvers beoogden vindt men aangeduid in deze regels welke wij lezen in het voorwoord des werks : « *Dit boek aan de Esperantisten biedende, hebben wij voor doel hun op eene eenigszins volledige wijze eene letterkunde te doen kennen die wel waardig is door hen gekend te worden : de Vlaamsche letterkunde. Reeds langs verschillende kanten en vooral in deze laatste tijden, hebben vertalingen van afgezonderde schrijvers het licht gezien ; maar, nooit tot op heden, heeft men eene verzameling uitgegeven van vertalingen van vertegenwoordigers eener zelfde letterkunde, verzameling bekwaam te doen kennen, hetgeen afzonderlijke vertalingen niet konden, de kern, de strekkingen, de hoedanigheden der letterkunde van een volk.* »

Om dat doel te bereiken, hebben de schrijvers, met de hulp eeniger Belgische Esperantisten, de schoonste bladzijden van talrijke Vlaamsche schrijvers, meesterlijk in proza of verzen vertaald. Onder de vertaalde schrijvers melden wij : David, Ledeganck, Conscience, Snieders, Van Rijswijck, Van Beers, Guido Gezelle, Bergmann, R. et V. Loveling, Antheunis, Van Oye, De Cort, Hugo, Verriest, Rodenbach, Pol de Mont, Hilda Ram, Noterdaeme, Stijn Streuvels, De Clercq, Broeckaert.

De vertalingen, met de grootste zorg gedaan, geven getrouwelijk de eigenschappen van het oorspronkelijke terug en bewijzen eens te meer (voornamelijk de lange bladzijden toegewijd aan de zoo moeilijk te vertalen werken van Guido Gezelle, Stijn Streuvels en anderen) onder opzicht der letterkundige vertalingen, den overgrooten voorrang der wederlandsche taal, op al de levende talen.

Dat werk verbeterd en goedgekeurd door Dr Zamenhof, zal onder de beste der Esperantische letterkunde gerekend worden en heeft recht op eene plaats in de boekenverzameling van al de Esperantisten, zoowel Belgische als vreemde ; het is ook geroepen om groote diensten te bewijzen in de propaganda van het Esperanto in België.

A. J. WITTERYCK.

Eltiraĵoj el "PAĜOJ EL LA FLANDRA LITERATURO."

Fantazio.

Preterflugas vataj nubetoj
Tralumataj de sunaj radioj.
Ilin vidas preterflugantajn
Revanta junulo....
Kaj senkonscie, post ĉiu nubeto
Dolĉe flugas for fantazio ;
Jen en la spaco ambaŭ foriĝas
For, for
Forege.

Preterflugas blankaj veletoj
Kie tnŝas ĉielon la maro.
Ilin vidas preterflugantajn
Revanta junulo....
Kaj senkonscie, post ĉiu ŝipeto
Dolĉe flugas for fantazio;
Jen trans la maro ambaŭ foriĝas
For, for,
Forege.

Preterflugas miraj figuroj
Posedantaj la forton de sorĉo.
Ilin vidas preterflugantajn
Revanta junulo....
Kaj post brilanta post ĉiu figuro
Vive flugas for fantazio;
Sed al la Leto ambaŭ rapidas
For, for,
Forege.

El A. Rodenbach.
p. 105.

El « La Linkampo » (De Vlasgaard).

La lino estas floranta
Verde kaj blue,
Venteto ĉirkaŭfluganta
Ame, senbrue.

Trunketoj lerte altigas
Molajn pintetojn,
Maldekstren, dekstren kurbigas
Siajn kapetojn;

Sensaĝaj kaj malhumilaj
Pro la flagetoj,
Al blua silko similaj
Sur verd-ŝtipetoj !

Abelo tie mordetas.....
Vidu to tien:
Insekto blanka saltetas
Nun for, nun reen !

Ĝis kie tiu bluaĵo,
Kiu verdiĝas,
Al grena cindra-grizaĵo
Vage perdiĝas,


Ĝis la okulo vidadas
Plilarĝiĝante,
La lino ĉie floradas
Balanciĝante.

El R. De Clercq.
p. 129.

3me Année, N° 27.
Novembre 1904.

3a Jaro, 27a Numero
Novembro 1904.

3e Jaar, Nr 27.
November 1904.



JOURNAL ESPÉRANTISTE BELGE MENSUEL.

BELGISCH ESPERANTISCH MAANDSCHRIFT.

PRIX DE L'ABONNEMENT ANNUEL :	KOSTO DE LA JARA ABONO :	JAARLIJKSCHE INSCHRIJVINGSPRIJS :
2.50 fr. pour la Belgique ; 3.00 fr. pour l'étranger. 5.00 fr. (minimum) : abonnement de protecteur.	2.50 fr. en Belgujo ; 3.00 fr. en eksterbelgaj landoj. 5.00 fr. (almenaŭ) : protektanta abonanto.	2.50 fr. voor België ; 3.00 fr. voor den vreemde. 5.00 fr. (ten minste) : inschrijving als beschermer.
Un numéro : 0.25 fr.	**Unu numero : 0.25 fr.**	**Het nummer : 0.25 fr.**

Ĉefredaktoro — Rédacteur en chef — Hoofdopsteller : Jos. JAMIN, 78, rue de la Longue Haie, Bruxelles.
Cenzuristo — Censeur — Keurder : Lucien BLANJEAN, 83, rue du Collège, Ixelles-Bruxelles.
Abonoj — Abonnements — Inschrijvingen : L. VANDERSLEYEN, 31, rue des Patriotes, Bruxelles.
Presisto — Imprimeur — Drukker : A.-J. WITTERYCK-DELPLACE, 4, Nouvelle Promenade, Bruges.

La Majskarabo

el « La Biblioteko de mia Onklo » R. Töpffer.

Estis dum la sezono de la majskaraboj. Ili tre amuzis min antaŭe, sed mi komencis ne plu trovi plezuron je ili. Kiom oni maljuniĝas !

Tamen, dum, sola en mia ĉambro, mi faris miajn kiel eble plej enuigantajn skriblaborojn, mi ne malŝatis la kuneston de iu el tiuj ĉi bestetoj. Mi ja ne intencis alligi ĝin al fadeno por ke ĝi flugu aŭ jungi ĝin antaŭ veturileto : mi jam estis tro multaĝa por min okupi pri tiaj infanaĵoj ; sed ĉu vi opinias ke nur tio estas farebla per majskarabo ? Gravega eraro ; de tiuj infanaj ludoj ĝis la seriozaj lernadoj de naturisto estas multe da trairotaj gradoj.

Mi posedis unu el ili kaptitan sub returnita glaso. La besteto klopode suprenrampis la flankojn sed baldaŭ refalis kaj rekomencis senĉese kaj senfine. Iafoje ĝi falis sur la dorso : tio estas kiel vi scias grava malfeliĉo por majskarabo. Antaŭ ol doni al ĝi helpon mi admiris ĝian paciencon por movigi malrapide siajn ses piedetojn en la spaco, dum ĝi ĉiam sed vane esperis alkroĉiĝi ĉe ia korpo kiu tie ne troviĝas. « Estas vere ke la majskaraboj estas malspritaj bestoj ! » mi opiniis.

Plejofte mi malembarasis ĝin prezentante al ĝi la ekstremaĵon de mia plumo, kaj tio kondukis min al la plej granda kaj la plej feliĉa eltrovaĵo ; tiamaniere oni povus diri kiel Berquin (Berkin) ke bonfaro restas neniam nerekompensita.

Mia majskarabo estis alkroĉiĝinta al barberoj de mia anserplumo kaj mi donis al ĝi tempon por malsveni dum mi skribis unu linion, estante pli atenta al ĝiaj agoj kaj movoj ol al tiuj de Julio Cesaro, kiujn tiumomente mi estis tradukanta. Ĉu ĝi forflugos aŭ malsupreniros laŭlonge de mia plumo ? Tamen de kio dependas ia afero. Se ĝi prenus la unuan decidon, mia eltrovaĵo ne ekzistus, kaj eĉ mi tion ne ekvidis ! Feliĉege ! ĝi ekmalsupreniris Kiam mi vidis ke ĝi alproksimiĝis inkon mi antaŭsentis ke gravaĵoj estas okazontaj, tiel Colombo ne vidante la teron antaŭsentis sian Amerikon. — Jen efektive la majskarabo alveninta al ekstremaĵo de la pinto de mia plumo, trempas sian vosteton en la inkon. Rapide blankan paperon.... estas la plej grava momento ».

La vosteto alvenas sur la paperon, demetas la inkon laŭ siaj movoj, kaj jen aperas mirindaj desegnaĵoj. Iafoje la majskarabo, ĉu pro genio, ĉu pro la acido, kiu dolorigas ĝiajn organojn, levas aŭ mallevas forpaŝetante sian voston. La rezultato estas punktaro, laboro mirinde delikata.

Aliafoje, forlasante sian ideon, ĝi flanken iras, poste, reforlasante la antaŭan ideon, ĝi revenas. Jen tio estas unu S; tion vidante, lumradio lumigas mian spiriton.

Mi metas la mirindan besteton sur la unuan paĝon de mia kajero, zorge provizinte ĝian vosteton per inko; poste, tenante pajleron por direkti la laboron kaj bari la vojon, mi devigas ĝin promenadi tiamaniere ke ĝi skribu mem mian nomon. Du horoj estis necesaj por tiu laboro, sed kia majstraĵo!

La plej nobla akiraĵo iam farita de homo, diris Bufon'o, estas.... estas certege la majskarabo!

***

Por direkti tiun movaron mi estis alproksimiĝinta al la fenestro. Ni ĵus finis la lastan literon kiam voĉo mallaŭte vokis: Amiko!...

Post tiu interparolado kiu estis iriginta min al la fenestro mi revenis al mia majskarabo.

Sendube mi paliĝis. La malfeliĉo estis grava, nerebonigebla: unue mi ekkaptis la kulpulon kaj mi ĵetis ĝin tra la fenestro. Poste mi ekzamenis kun teruro la situacion.

Estis videbla longa nigra streko, kiu de la IV^{a} Ĉapitro de Belgo-Gallico sin direktis rektlinie al la maldekstra paĝrando, tie la besteto trovinte la bordon tro kruta por malsupreniri estis reveninta al la dekstra paĝbordo, poste suprenirinte Norden, ĝi decidis transiri de la libro sur la bordon de la inkujo; de tie laŭlonge malkruta kaj glata deklivo, ĝi estis glitinta en la profundegaĵon, en la gehenon, en la inkon, malfeliĉe por ĝi, kaj por mi...

Tie la majskarabo, bedaŭrinde kompreninte ke ĝi eraris, decidis returnen iri kaj, kvazaŭ vestita funebre de la piedoj ĝis la kapo, ĝi estis elirinta el la inko por reiri al la Ĉapitro IV^{a} de Belgo-Gallico, kie mi ĝin retrovis nenion komprenantan pri tio ĉi. Estis makulegoj, lagoj, riveroj kaj aro da katastrofoj sen ia delikateco, sen ia arto... Vidaĵo nigra kaj terura!!

Nu tiu ĉi libro estis Elzeviro de mia instruisto, Elzeviro in-8°, Elzeviro maloftega, multekosta, ne plu trovebla kaj komisiita al mia respondeco kun la plej gravaj rekomendoj. Evidente mi estis tuj nepardoneble kondamnota....

Mi sorbigis la inkon per sorba papero, mi sekigis la paperon kaj mi ekpripensis pri mia sorto. Mi sentis pli da timego ol da riproĉoj de konscienco. Unu afero precipe min tremigis t. e. ke mi estis konfesonta pri la majskarabo. Per kiel terurigaj okuloj mia instruisto konsideros tiun hontigan manieron laŭ kiu, per danĝeraj infanaĵoj, mi malbonuzis mian tempon dum la raciplena aĝo, kiun, kiel li diris, mi nun estis atinginta. Tio tremetigis min.

Demono je kiu mi ne malfidis tiumomente, ekoferis al mi kvietigilojn. Demono ĉiam ĉeestas en horo de l' tento. Li prezentis al mi mensogeton. Mi dirus ke dum mia foresto tiu abomeninda kato de la najbarino estis enirinta en mian ĉambron kaj estis renversinta la inkujon sur la ĉapitron IV^{an} de Belgo-Gallico. Ĉar mi ne povis eliri inter du lecionoj, mi estus pravigonta mian foreston per la neceso aĉeti plumon. Ĉar la plumoj kuŝis en la ŝranko, atingeblaj de mi, mi konfesus ke mi perdis la ŝlosilon hieraŭ en la banejo. Ĉar mi ne ricevis permeson por iri al la banejo, kaj ĉar efektive mi ne estis irinta tien mi supozas ke mi iris tien sen permeso kaj mi konfesus tiun kulpon: tio donus al la certifiko grandan verŝajnon kaj malgrandigas miajn konsciencajn riproĉojn tial ke mi propramove konfesus kulpon, agon kiu, laŭ mia opinio, preskaŭ senkulpigis min.

Tiu majstra kombino estis preskaŭ preta kiam mi aŭdis la paŝon de S^{ro} Ratin suprenironta la ŝtuparon. En mia malkvieto mi fermis la libron, malfermis ĝin, refermis ĝin ankoraŭ por denove remalfermi ĝin, pensante ke la makulego mem parolos kaj evitos al mi la teruran embarason de la ekklarigo.

S^{ro} Ratin venis por instrui mian lecionon. Ne vidinte la libron li deprenis sian ĉapelon, li lokis sian seĝon, li sidiĝis, li purigis la nazon. Por havi sintenadon mi ankaŭ purigis la nazon, pri kio S^{ro} Ratin fikse alrigardis min: ĉar rilatis nazoj... Komence mi ne komprenis ke S^{ro} Ratin elserĉis kian intencon mi havis purigante mian nazon preskaŭ samtempe ol li; tial, supozante ke li ekvidis la makulegon, mi mallevis la okulojn; mi estis pli malkvietigita per lia scivola silento ol mi estus per liaj demandoj je kiuj mi scius tuj respondi. Fine per solena voĉo:

— « Sinjoro mi legas sur via vizaĝo...

« Ne sinjoro..

« Mi legas, mi diras... »

« Ne Sinjoro, estas la kato de... » mi interrompis.

Je tiuj vortoj, la sango alfluis en kapon de S^{o} Ratin, li koloriĝis, tiom tiu respondo ŝajnis al li transpaŝi ĉiujn limojn de malrespekto, kaj li estis kaptonta energian decidon. Kiam okuloj ekvidis la abomenan makulegon... Tio kaŭzis eksalton kiu returne kaŭzis similan ĉe mi. Estis la momento por sin ŝirmi kontraŭ katastrofo. « Sinjoro, dum mi forestis... la kato,... por aĉeti plumon... la kato... ĉar mi perdis la ŝlosilon... hieraŭ en la banejo... la kato... »

Dum mi parolis la rigardo de S^{ro} Ratin fariĝis tiel terura ke fine, ne povante plu elteni ĝin, mi senpere konfesis miajn krimojn: « Mi mensogas... S^{ro} Ratin... estas mi kiu faris la malfeliĉon. » — Longa silento fariĝis.

« Ne miru, Sinjoro, » diris S^{ro} Ratin, per solena voĉo « se la troeco de mia indigno premas kaj malrapidas ĝian esprimon; mi diros eĉ ke la esprimo mankas al mi por ŝati...» tiam muŝo... ekblovo da ekridego trakuris mian vizaĝon... Denove daŭra silentado. Fine S^{ro} Ratin stariĝis.

« Vi restos, Sinjoro, du tagojn en via ĉambro por pripensi pri via konduto, dum mi men pripensos pri tio kion mi decidos en situacio tiel gravega! ».

Tion dirinte S^{ro} Ratin eliris, ŝlosante la ĉambron kies ŝlosilon li kunprenis.

Tradukis la lernantoj de la Kurso organizita de *Antverpena Esperantista Grupo.*

Tra la Mondo Esperantista.

Niaj gelegantoj konas, almenaŭ nome, la interesan libron de Sinjoroj L. Leau kaj L. Couturat titolitan : Historio de la Universala Lingvo. Tiu grava verko, France skribita, kostas dek frankojn ; tio estas diri ke multaj Esperantistoj ne povis ĝin akiri. Tial la aŭtoroj ĉerpis el sia longa verko, la paragrafojn la plej interesindajn, tio estas diri kelkajn ekzemplojn de ĉia sistemo : el la sistemoj « a priori » 1e Descartes kaj Leibnitz, 2e Sotos Ochando ; el la miksaj sistemoj : Volapuk ; el la sistemoj « a posteriori » 1e Idiom neŭtral, 2e Esperanto. La nova libro kostas nur unu frankon kaj niaj amikoj trovos en ĝi multajn materiojn ĉu por paroladoj, ĉu por artikoloj, ĉu por disputoj kaj argumentoj.

Ni ankaŭ ricevis broŝuron skribitan en Bulgara lingvo, kiun ni ne povas bedaŭrinde legi sed kiu traktas la Evolucion de la Lingvo Internacia ; la verkisto estas Sro Jonko Davidov el Silistra. Niaj Germanaj samideanoj ne intencas resti malantaŭe ; ni ricevis du broŝurojn : 1e la duan eldonon de la verko de Sro J. Borel : La demando pri internacia helpanta lingvo kaj Esperanto ; 2e novan verkon de Sro Bruno Zierenberg pri Akcepto de Esperanto por la komercistoj. Tiuj broŝuretoj estas ambaŭ en germana lingvo kaj montras, ankoraŭ unufoje, la daŭrantan agadon de niaj amikoj tie.

***

Tio ne estas la solaj libroj aperigitaj dum tiuj ĉi lastaj tagoj ; Sro Joseph Delfour kiu jam donis al nia afero multajn pruvojn de senlaca propagando sendas al ni sian broŝureton, neeldonitan, titolitan : Mia Vilaĝo. Tiuj malmultaj paĝoj, skribitaj en la plej pura stilo, premas la koron kaj al ni donis senton ĉarman kaj samtempe melankolian.

La aŭtoro pardonos al ni, sed ni ne povas plibone montri al niaj gelegantoj la ĉarmon kiu elvenas de la lego de tiuj paĝoj, ol reprodukti la finon de la libro. « Mercuès » estas la nomo de la vilaĝo, kie naskiĝis Sro Joseph Delfour ; la aŭtoro priskribis la pejzaĝon kaj la historion de la loko, sekve tiel finigas :

« Mercuès ĉiam havos sian dediĉan feston, sian kamparan balon, sian akrasonan muzikon. Al ĝi ankaŭ « restos ĝia preĝejo, kaj post la preĝejo, ĝia tombejo, kies alta herbo kliniĝas sur la vojon, ĝia « tombejo, kie kuŝas ĉiuj niaj, nin antaŭirintaj al tiu alia vivo de l' nekonataĵo, tombejo kie dormas mia

A travers le Monde Espérantiste.

Nos lecteurs connaissent au moins de nom, l'intéressant livre de MMrs L. Leau et L. Couturat intitulé : *Histoire de la Langue Universelle.* Cet important travail, écrit en français, coûte dix francs ; c'est dire que beaucoup d'Espérantistes n'ont pu en faire l'acquisition. C'est pourquoi les auteurs ont puisé dans leur long exposé les chapitres les plus dignes d'intérêt c'est à dire quelques exemples de chaque système ; parmi les systèmes « a priori » 1o Descartes et Leibnitz, 2o Sotos Ochando ; parmi les systèmes mixtes : le Volapuk ; parmi les systèmes « a posteriori » 1o l'Idiom neutral, 2o l'Esperanto. Le nouveau livre ne coûte qu'un franc et nos amis y trouveront beaucoup de matériaux soit pour des conférences, soit pour des articles, soit pour des discussions ou des arguments.

Nous avons aussi reçu une brochure écrite en langue bulgare, que nous ne pouvons malheureusement pas lire, mais qui traite de l'Evolution de la Langue Internationale ; l'auteur est Mr Jonko Davidov de Silistra.

Nos partisans allemands n'ont pas l'intention de rester en arrière ; nous avons reçu deux brochures : 1o la seconde édition de l'exposé de M. J. Borel : *Die Frage einer internationalen Hilfssprache und das Esperanto* ; 2o une nouvelle brochure de M. Bruno Zierenberg : *Ueber die Bedeutung der Esperanto-Sprache für den Handelsstand.* Ces brochures sont l'une et l'autre en allemand et montrent encore une fois, l'action soutenue de nos amis là-bas.

***

Ce ne sont pas les seuls livres parus ces jours derniers ; M. Joseph Delfour qui déjà a donné à notre cause de nombreuses preuves de propagande inlassable, nous envoie sa brochure inédite intitulée : *Mon village.* Ces quelques pages, écrites dans le style le plus pur, vous prennent au cœur et nous ont donné une sensation charmante en même temps que mélancolique. L'auteur nous pardonnera, mais nous ne pouvons mieux montrer à nos lecteurs le charme qui s'élève de la lecture de ces pages qu'en reproduisant la fin de ce livre.

« Mercuès » est le nom du village, où naquit M Joseph Delfour ; l'auteur décrit le site et l'histoire du pays et finit ainsi :

« Mercuès aura toujours sa fête votive, son bal champêtre, « sa musique acide. Il lui restera aussi son église, et derrière « l'église, son cimetière, dont l'herbe haute se penche sur le

Dwars door de Esperantische wereld.

Onze lezers kennen, ten minste van name, het belangwekkend boek der HH. L. Leau en L. Couturat getiteld : Histoire de la Langue Universelle. *Dit belangrijk werk, in het Fransch geschreven, kost tien frank ! 't is te zeggen dat vele Esperantisten het niet kunnen koopen hebben. 't Is daarom dat de schrijvers uit hunne lange bewerking, de meest belangbiedende deelen genomen hebben, 't is te zeggen eenige voorbeelden van elk stelsel ; onder de stelsels « a priori » 1. Descartes en Leibnitz, 2. Sotos Ochando ; onder de gemengde stelsels : het Volapuk ; onder de stelsels « a posteriori » 1. het Idiom neutral, 2. het Esperanto. Het nieuw boek kost slechts éénen frank en onze vrienden zullen er veel stoffe vinden, 't zij voor voordrachten, 't zij voor artikelen, 't zij voor besprekingen of bewijsvoeringen.*

Wij hebben ook een boekje ontvangen in Bulgaarsche taal geschreven, dat wij ongelukkiglijk niet kunnen lezen, maar dat handelt over de Omwenteling der wederlandsche taal ; de schrijver is M. Jonko Davidov van Silistra.

Onze Duitsche aanhangers zijn niet van zin achter te blijven ; wij hebben twee vlugschriften ontvangen : 1. de tweede uitgave van het bewijsstuk van M. J. Borel : Die Frage einer internationalen Hilfssprache und das Esperanto ; *2. een nieuw schrift van M. Bruno Zierenberg :* Ueber die Bedeutung der Esperanto-Sprache der Handelsstand. *Deze boekjes zijn, het eene en het andere, in het Duitsch en toonen nog eens, de aanhoudende werking onder van ginder.*

***

Het zijn de eenige boeken niet die in deze laatste dagen verschenen ; M. Joseph Delfour die reeds aan onze zaak talrijke bewijzen van onvermoeibare propaganda gegeven heeft, zendt ons zijn onuitgegeven brochuur, getiteld : « Mon village ». *Deze eenige bladeren, in den zuiversten stijl geschreven, pakken u tot in het hart en hebben ons eene liefelijke en tenzelfden tijde weemoedige ontroering gegeven. De schrijver zal ons vergeven, maar wij kunnen aan onze lezers niet beter het liefelijke toonen, dat uit de lezing dezer bladzijden opkomt, dan met het einde van dit boek over te schrijven.*

« Mercuès is de naam van het dorp, waar M. Joseph Delfour geboren werd ; de schrijver beschrijft de ligging en de geschiedenis van het land en eindigt alzoo :

« Mercuès » zal altijd zijn beloofd feest, zijn landelijk dansfeest, zijne scherpe muziek hebben. Hem zal ook overblijven zijne kerk, en achter de kerk, zijn kerkhof, welks hoog gras over den weg helt,

« patro, kiun forrabis de mi la morto, kvazaŭ malkuraĝa kaj perfida ŝtelisto nokte venanta, mia kompa-
« tinda patro, ho ve ! por kiu estis tiel granda plezuro iri al mi renkonte ĉe l' vesperoj de mia reveno al
« la vilaĝo !.... »

La fila amo de la aŭtoro donis al li okazon skribi tiujn korpremantajn liniojn.

* * *

Multaj Esperantistoj skribas poeziaĵojn sed ni ne ĉiam trovis en iliaj verkoj la belan takton kiun ni trovis ĉe la versoj de niaj plej bonaj aŭtoroj, kiel ekzemplo ĉe la poeziaĵoj enlokigitaj en Krestomatio de D[ro] Zamenhof.

S[roj] J. Parisot kaj Th. Cart ĵus eldonis broŝuron kiu helpos multe la venontajn aŭtorojn. « Esperanta « versfarado laŭ verkoj de D[ro] Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj » estas eldono de la Esperanta kolekto de « Lingvo Internacia ». Tiu kolekto baldaŭ eldonos multajn novajn librojn kaj kun plezuro, ni legis ke baldaŭ la dua eldono de la ĝoja libro de S[ro] P. de Lengyel, « Libro de l'Humoraĵo » malmulte konata de la novaj Esperantistoj, aperos sub la 7[a] numero.

S[ro] Kolowrat, el St. Peterburgo rikoltis pacience la rimojn de la lingvo kaj liaj serĉadoj estos tre utilaj por la multaj poetoj uzante Esperanton. La sama aŭtoro verkis kanton, parolojn kaj muzikon; li elektis la belan titolon : Kuraĝe antaŭen !

* * *

La Societo Esperantista en Brunno (Moravujo) organizas en tiu urbo kaj aranĝos espereble ankaŭ en aliaj urboj Esperantan ekspozicion ; tial tiu societo bezonas propagandilojn el ĉiuj landoj, afiŝojn, cirkulerojn k. t. p.

